



estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).

Numero 229

Majo, 2005

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto
Stevens Norvell — kompostisto
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto
Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Bob Williamson
329 Poplar Drive
Dartmouth, Nova Scotia
KANADO B2W 4K8
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:
Reni Porter
71 RidgeValley Road
Halifax, Nova Scotia
KANADO B3P 2E5

Abona kosto por Kanado estas \$8, por Usono \$12, kaj por aliaj landoj estas \$20



MIRTELOJ DE LA MONTO

Pasintan someron, mi revenis al la monto kun mia familio por kolekti mirtelojn. Ni sidis sur la tero, babilante, ŝercante, kolektante – kaj gvatante, ĉar estas ursoj sur la monto, kaj mirteloj plaĉas ankaŭ al ili.

La monto, Keppoch [pron: kepak] (skot-gaele, Cheapach [pron: ĥepaĥ]), estis la hejmo de miaj praavoj, kiuj venis de Britujo antaŭ preskaŭ ducent jaroj. La skot-gaela estis la lingvo de la familio de Allan MacDonald, kiu venis de Skotlando kaj parolis malmulte la anglan. La familio de Christopher Druhan, kiu venis de Irlando, parolis angle. Sed iel, Catherine, la filino de Allan, kaj Patrick, la filo de Christopher, interkomprenis, ĉar ili geedziĝis, kaj loĝis sur la monto. Ilia filo, Johnny Pat Druhan, loĝis ĉe la bazo de la monto kiam li edziĝis. Lia filino, Mary Druhan, translokiĝis al la farmbieno de sia edzo, mia avo, Frank MacLean, kelkajn kilometrojn for de la monto. Sed ŝi revenis al la monto por viziti parencojn kaj kolekti berojn. Mia patrino memoris sian onklinon, Katie, kiu forirus frumatene de la patra domo ĉe la bazo de la monto kun du malplenaj siteloj, kaj revenus vespere kun la siteloj plenplenaj de fragoj, framboj, mirteloj, k.t.p. – onidiras, ke Katie konis ĉiun ber-arbuston sur la monto.



Ankaŭ ni iris ĉiu-somere, kiam mi estis infano. Mi iris kun mia patrino, mia avino, kaj miaj gefratoj. Ni sidis sur la tero (estis la nura okazo, ke mia avino surmetis pantalonon anstataŭ robon!), babilis, ŝercis, kolektis (kaj iomete manĝis) mirtelojn – kaj gvatis por ursoj. Poste ni

iris hejmen kun siteloj plenaj de mirteloj dolĉaj, kiujn mia patrino frostigis por vintra bakado.

Sed mia avino pliaĝiĝis, kaj ŝi ne plu povis iri. Kaj ni, la genepoj, pliaĝiĝis kaj tro okupiĝis por iri. Mi iris al universitato, foriris por labori, edziniĝis, kaj naskis infanojn. Antaŭ kvin jaroj, mi translokiĝis al Antigonish kun mia edzo kaj infanoj. Mia avino, Mary Druhan MacLean, mortis antaŭ tri jaroj. Dum multaj jaroj mi ne iris al la monto.



Sed, je bela septembra feria tago, ni iris – mia patrino, mia onklino, miaj du pliaĝaj filinoj, kaj mi – tri generacioj denove sur la monto kie niaj praavoj alvenis, loĝis, geedziĝis, naskis infanojn, vivis kaj mortis. Por mi, historio, familio kaj tradicio ĉiuj kunvenis sur la monto tiutage, kaj mi estis kontenta. Kaj mi memoris tiun kontenton kiam, por vintra bakado, mi prenis el mia kongelujo mirtelojn de la monto.

— Laurinda Matheson

S-RO GRAHAM STEELE: Sinjoro Prezidanto...

Konsidere ke la Esperanta lingvo estas simpla, fleksebla kaj belsona, kaj celas esti dua lingvo por ĉiu en la mondo; kaj

Konsidere ke la Esperanta-Rondo de Halifax-Dartmouth eldonas ĉiumonatan revuon, kiu nomiĝas *Inter Ni* kaj kiun oni enpoŝtigas trans la nacio kaj trans la mondo; kaj

Konsidere ke la apero de la maja numero 2005 (dumil kvin) rimarkindigas la komencon de la dudeka eldonojaro de *Inter Ni* per ties 229-a (ducent dudek naŭa) numero:

Pro tio ni rezoluciigu ke la Nov-Skotia Ĉambro de Deputitoj gratulas la redaktorojn kaj la verkistojn de la Nov-Skotia esperanta eldonaĵo, *Inter Ni*, kaj deziras al ili daŭran sukceson.

Kiel redaktoro de *Inter Ni* mi fieras pro tio, ke la 5-an de majo 2005 estis aprobita ĉi-tiu rezolucio en la provinca parlamento de Nov-Skotio, Kanado. La dulingvan Rezolucion n-ro 3690 aperigas la provinca eldono de *Hansard*, rete trovebla ĉe:

http://www.gov.ns.ca/legislature/hansard/han59-1/house_05may05.htm

Provinca parlamentano Graham Steele (pr. Grejam Stil)

<<http://www.grahamsteele.ca/esperanto.html>> jam estas progresanto, kaj li meritas nian koran dankon pro la rezolucio. Kiel UEA Prezidanto Renato „Korseti“ skribis pri sia korespondaĵo kun Graham, „Nur vera esperantisto kapablas skribi sian nomon en Esperanto.”

— la redaktoro

NOVA MONDVOKILO POR ESPERANTUJO

Lastatempe mi akiris senpagan programaron, "Skype" [pr: skajp]. Ĝi ebligas senpagajn voĉ-vokojn perrete al ĉiuj, kiuj ankaŭ havas ĝin (kiel telefono – red.). Plue, ĝi ankaŭ ebligas kaj ek-mesaĝon kaj grup-voĉ-kunvenojn, kaj malmultekostajn voĉ-vokojn al la telefonoj de tiuj, kiuj ne havas Skajp-on.

Ĝi multe ek-furoras; pli ol cent milionoj da uzantoj elŝutis ĝin en la lastaj monatoj; kaj 2 aŭ 3 milionoj parolantoj uzas ĝin je ĉiu horo. La retloko estas:

<http://www.skype.com>

Nu do, mi mem ne estas tiom gregema; en mia nuna vivo mi ne multe telefonvokas, nek leteras, nek plumamikas, nek ret-poŝtas, nek "ek-mesaĝas". Sed: Skajpo estas de nove mirindaĵo de nia ret-epoko, kaj, ja, potenca ilo en la manoj de samideanoj. Jen kelkaj spertoj:

Mi facile elŝutis kaj pretigis Skajpon. Mi preparis mem-priskribeton, en kiu mi elektis "Esperanto"-n el granda menuo de lingvoj. Preskaŭ tuj (!) alvenis vokanto: virino en Pollando.

Per Skajpo oni petas al iu ajn, ĉu tiu volas havi vin sur ties Skajpa-listo de kontaktuloj. Mi ne petis, sed subite, preskaŭ kiel krev-maizo, mi estis petata. Nu, mi troigas; sed post kelkaj tagoj, mi jam konversaciis kun samideanoj en Pollando, Belgio, Koreio, Provinco Mongolio de Ĉinio, Brazilo, Germanio, ktp. Ties lingvo-nivelo varias de nov-bakita ĝis lerta.

Kaj hieraŭ, envenis voko de koreo, kiu eĉ pli malfermis miajn okulojn al la latenaj ebloj de Skajpo. Li lernis Esperanton antaŭ 25 jaroj, sed ĝi iompostiome dormiĝis por li pro manko de interago; li supozis, ke la lingvo malaperis. Antaŭnelonge, per Google, li lernis ke Esperanto ja floras; kaj antaŭ monato li akiris Skajpon. Li loĝas en urbo de Koreio sen aliaj Esperantistoj (kaj kun ne-Esperantista edzino). Pro tio, li neniam povis ekzerci sin pri nia parolata lingvo. Subite, per Skajpo, li povas voki ĉien en la mondo, kaj konversacii Esperante (flue).

Malgraŭ tio, ke mi ne celas esti Skajpanto, mi vidas veran tutmondan komunikilon por ligi malproksimajn kaj solajn samideanojn per pli ol plumoj. La kibernetika „arsenalo” de Esperanto senĉese kreskas: Google; Vikipedio; Ĝangalo; ktp; kaj nun, Skajpo.

— Gene Keyes

INTELIGENTEC-DEMANDARO

La jena eta demandaro enhavas kvar pensigajn demandojn por taksii la nivelon de via inteligenteco. La demandoj ne estas tiom malfacilaj:

1) Kiel oni enmetas ĝirafon en fridujon?

La ĝusta respondo estas: Malfermu la fridujon, enmetu la ĝirafon, kaj fermu la pordon. Ĉi tiu demando kontrolas, ĉu oni povas solvi simplajn problemojn rekte kaj sen komplikaj metodoj.

2) Kiel oni enmetas elefanton en fridujon?

Malĝusta respondo: Malfermu la fridujon, enmetu la elefanton, kaj fermu la pordon.

Ĝusta respondo: Malfermu la fridujon, enmetu la ĝirafon, enmetu la elefanton, kaj fermu la pordon. Tiu mezuras vian kapablon trapensi la rezultojn de viaj agoj.

3) La Leono-Reĝo gastigas bestan konferencon. Ĉiuj bestoj ĉeestas, krom unu. Kiu besto ne ĉeestas?

Ĝusta respondo: La elefanto. La elefanto estas en la fridujo. Ĉi tiu testas vian memoron.

Nu, eĉ se vi ne ĝuste respondis la unuajn tri demandojn, vi havas ankoraŭ unu pluan okazon por montri viajn kapablojn:

4) Estas rivero kiun vi devas transiri. Sed ties enloĝantoj estas krokodiloj. Kiel vi transiros la riveron?

Ĝusta respondo: Vi transnaĝu. Ĉiuj krokodiloj ĉeestas la bestan konferencon. Ĉi tiu determinas, ĉu vi tuj lernas de viaj eraroj.

La firmao Anderson Konsultado Tutmonde diras ke ĉirkaŭ 90% el la profesiuloj kiuj ekzameniĝis respondis malĝuste al ĉiuj demandoj. Tamen, multaj kvarjaruloj trafis kelkajn ĝustajn respondojn.



— El la Reto tradukis Gene Keyes

